

Gvidilo pri Simpoziaj Kajeroj

Se okazos Simpozio en ILEI-konferenco, ILEI devas pretigi interkonsenton inter si kaj la organizantoj de la simpozio (kutime la ILEI-LKK kaj eventuale eksteraj instancoj).

Kondiĉo por partopreno kiel kontribuanto en la simpozio estas la livero de prelegresumo kvar monatojn antaŭ la aranĝo, kaj de la plena teksto unu monaton antaŭe.

La organizantoj kaj ILEI konsentas almenaŭ kvar monatojn antaŭ la seminario interalie pri:

- temposkemo por la aperigo de la kajero
- la redakta teamo kiu pretigos ĝin.
- la lingvoj de la kajero.
- la eldonkvanto, preskvalito kaj konsidereblaj preslokoj de la kajero.
- eventualaj klopodoj akiri subvenciojn por la eldonado.

ILEI pretigas dokumenton kun teknikaj normoj por ĉiuj Simpoziaj Kajeroj; aŭtoroj devas liveri siajn kontribuaĵojn jam laŭ tiu normaro. ILEI povas pretigi ŝablonon tiucele; stilgvidilo pri bona lingvouzo estas ankaŭ dezirinda.

La lingva reviziado devas esti almenaŭ parte plenumata de persono kies denaska lingvo estas alia ol tiu de la lando, kie okazas la simpozio. Estu malgranda revizia teamo, tiel ke artikoloj estu kontrolitaj de personoj kun denaska lingvo alia ol la verkinto. ILEI nomumas sian propran lingvan revizianton fari lastan kontrolon antaŭ la aperigo sub la ŝildo ILEI.

La fizika presado estas kutime nigra-blanka kun simpla kovrilo, krom se ekstera subvencio permesas ion pli luksan. La volumo prenas la ISSN-numeron de IPR, kaj sekve iĝas ĝia suplemento, sed ĝi estas aparte pagenda suplemento. Per apliko de la supraj kondiĉoj, la kunmetado kaj kontrolo de la kajero devas povi rapide progresi, tiel ke ĝi aperu samjare kiel la Simpozio mem.

Dum la preparado, la organiza teamo raportas al ILEI, se la temposkemo riskas ne esti observata, aŭ se okazas signifaj ŝanĝoj al la interkonsentitaj eroj.

Ĉi tiu gvidilo povos post adapto utili ankaŭ por aliaj ligaj eldonaĵoj. La dokumentoj pri teknikaj normoj povas servi ne nur por la simpoziaj kajeroj, sed oferti utilajn principojn ankaŭ por ajna eldonprojekto de la Ligo.

SMG, 14 Sept, 2010, ĝisdatigo 1 feb, 2011.

